Espéranto Angers

# La Letero

2019 - 06 + 07



fotisto: Liba GABALDA

# Fervojista kongreso en Hispanio

## 180 aliĝintoj el 23 landoj !

El Eŭropo sed ankaŭ el Meksikio, Brazilo, Ĉinio, Japanio kaj Koreio, sume 180 aliĝintoj el 23 landoj kunvenis en Malago de la 1-a ĝis la 9-a de majo !
Ili partoprenis en triobla kongreso, tiu de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, kaj ankaŭ la Hispana kaj Andaluzia Esperanto-Kongresoj.

En la programo, trajnoj kaj reloj ! Fakaj kunsidoj, prelegoj pri novaĵoj ("La AVE, hispana grandrapida trajno, en Mekko", "Hyperloop / Hipervojo"), ekskursoj (fervoja linio / Zafarraya...), sed estis programeroj ankaŭ por ĉies gustoj : atelieroj kaj prelegoj (informadiko, la "Programo Erasmus", "La Homo sur la Luno"...) kaj ĉiuvespere rendevuis kulturo kaj artoj (kastanjetoj, andaluzia muziko...).

La aranĝo finiĝis per postkongreso en norda Maroko por malkovrigi al la kongresanoj regionon malpli konatan ol La Costa del Sol !

La venonta kongreso de la Esperantistaj Fervojistoj okazos ĉe la pola-germana limo, en la du urboj Frankfurt an der Oder (Frankfurto ĉe Odro) kaj Słubice.

*Laurent*

HUMURO :
Sinjoro demandas al maljuna virino surstrate :
- Ĉu vi vidas policistojn?
- Ne !
- Do donu al mi vian mansaketon !

ESPERANTO
92a SAT-KONGRESO
BARCELONO
4 - 11 aŭgusto 2019

104-a UNIVERSALA
KONGRESO de
ESPERANTO
LAHTIO–FINNLANDO
20–27 julio 2019

# Legindaj libroj :

Eblas pruntepreni inter niaj multnombraj libroj :

« AVO BICIKLAS ĈIRKAŬ LA MONDO » far Zef JEGARD
2004 Franco N° 135




*Zef JEGARD havas du ŝatokupojn : bicikladon kaj esperanton. Lia revo ? Bicikli ĉirkaŭ la mondo, laŭ la 50a paralelo en tri etapoj. En tiu verko, li traktas pri siaj unuaj du vojaĝoj : la unua finiĝas meze de Rusio ĉe la Bajkala lago, la dua kondukas nin kun ĉiutagaj detaloj tra Pakistano, Ĉinio, Mongolio kaj Siberio. Ni ankaŭ renkontas homojn en ilia tagtaga vivo kaj koniĝas kun la esperantista « familio », gastama kaj varmkora !*

*Arlette*
(Ne hezitu sendi al ni recenzon pri libro en esperanto kiun vi mem legis...)

# SANON... !

Por daŭrigi nian agrablan renkontiĝon de la 28-a de aprilo pri « Humuro + Esperanto » ni deziras ***sanon al ĉiuj*** per la ĉi-suba recepto. Temas pri nia loka kaj tipa koktelo '***soupe angevine'*** (anĝeva supo) ; tipa por la regiono *Pays de la Loire* kaj pli specife por Anĵuo kaj por ties ĉefurbo Angers (Anĝevo) kie naskiĝis "*Cointreau*" [kŭintro] (mondfama likvoro farita el alkoholo, sukero kaj oranĝŝeloj). La anĝeva supo estas **festa aperitivo,** tradicie preparata en granda poto, kaj kuleregon oni uzas por plenigi la glasojn.




**Ingrediencoj** : Por kvar personoj
preparado : 10 minutoj
unu botelo da *'Crémant'-de-Loire'*
unu citrono
15 cl da likvoro *Cointreau*
12 cl da siropo de kansukero

Refreŝigu la botelon da *Crémant de Loire*
Premu la citronon
Kiam la botelo estas sufiĉe freŝa, elverŝu la entenaĵon en poton, aldonu la likvoron *Cointreau,* la siropon de kansukero, la premitan citronon.

Servu freŝege. *Geneviève kaj Lucien*

HUMURO :
- Ĉu vi sentis vin malsana kiam vi tranĉis vian edzinon en etajn pecojn antaŭ ol kuiri ŝin ?
demandas la juĝisto al la kondamnito.
- Ja... en iu momento... mi ekploris.
- Ha tamen ! ... kaj kiam ?
- Kiam mi senŝeligis la cepobulbojn !

# TEGMENTOJ



Ĉi-jare ni restaŭras la tegmenton de la dekstra/okcidenta kromdomo de la bieno de Greziljono.
Cetere, sekve de likado en la ĉefa ŝtuparo de la kastelo dum abunda pluvo, la tegmentistoj laboros ankaŭ pri la kastelo, supre de la centra turo, kaj refaros la tegmentan vitraĵon de la lumputo (internan vitraĵon kiun oni ne povas vidi el la korto).

*Frédéric*




# Kursofino


Ĉi-jare denove ni ĉiuj kune kore dankas Jeanik, Laurent kaj Pierre por iliaj kursoj !

Geneviève: " Marie-Lyse parolis pri "poemeto" kaj fotoj faritaj por danki Jeanik. Ŝi bonvolis sendi ilin al mi ĉar mi certas ke tio povus esti interesa por nia letero de Junio. Kion vi opinias ? "

Frédéric: " Jes ! Ni povas eldoni ĝin ! "




*Jeanik: " Fakte temas pri akrostiko (legu la unuan literon de ĉiu linio!) ; brave Marie-Lyse !".*




**Espéranto-Angers**
3 allée du Haras, Appt 132, 49100 Angers, France
Tél. +33 (0)2 41 20 19 40 - http://www.esperanto-angers.fr - info@esperanto-angers.fr - *Korektado : Laurent kaj Jeanik*